

Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 12-an de aŭgusto 2021 per Zoom

Ĉeestis

Bård Hekland, Jardar Eggesbø Abrahamsen, Lars Sandbakk, Claude Rouget, Vidar Skretting, Marianne Lund

1. Tagordo

Oni aprobis la tagordon.

2. Prezento de la estraranoj

Ne necesis nova prezento, ĉar la ĉeestantoj jam prezentis sin dum la pasinta kunveno.

3. Protokolo de la kunsido 01.07.2021

La protokolo de la pasinta kunveno jam aprobiĝis rete. Neniu deziris aldone komenti ĝin.

4. Ŝanĝoj ĉe Brønnøysund-registroj. Marianne ĝisdatigas.

Marianne kolektas ĉies personajn numerojn kaj prizorgas la registradon de la ŝanĝoj ĉe Brønnøysund-registroj.

5. Problemoj pri nia retpoŝta servilo, ricevo kaj plusendo. Jardar ĝisdatigas.

Ni ekdiskutis la temon retpoŝte jam antaŭ la kunsido.

La diskuto koncernas plurajn, interplektitajn demandojn: Kiel plej efike kaj bone komuniki kun niaj membroj? Ĉu ni serĉu pli bonan solvon por registri membrojn kaj memori pri pagenda kotizo? Ĉu ni plu bezonas NJE-liston kaj NEL-diskut?

La nuna servilo post iom da tempo ne plu funkcios kaj ne estos anstataŭigita per alia. Samtempe ni konstatas, ke NEL-diskut perdis sian aktualecon (oni ne plu kutimas uzi retpoŝton por diskutoj) kaj ke NEL-inform estas modeste uzata.

Ni decidis provekuzi la sistemon «Spond», kiu espereble povos solvi plurajn niajn bezonojn (pri informado al la tuta membraro au subgrupoj de ĝi, membrodiskutoj en la formato «ĉefmesaĝo + komentoj», kotizpagigo, registro de membroinformoj ktp.). Avantaĝo de «Spond» estas ke ĝi ŝajne estas sen ideologiaj obstakloj kaj sufiĉe personsekura.

Ni diskutis, ĉu ni plu bezonos la retlistojn NJE-listo kaj NEL-diskut kaj ĉu indas transmeti ilin al aliasoj, kio signifus eblan ricevon ankaŭ de spam-mesaĝoj. Ni pripensos, ĉu estonte fini la ekzistadon de NJE-listo kaj NEL-diskut ekde certa dato. Jardar respondecas pri la elekto de retpoŝta servilo kaj transmeto de niaj adresoj (inkluzive de aliasoj kiel oficejo, estraro ktp) al retpoŝta servilo.

6. Propono de UEA pri Unesko-tago (vidu i.a. mesaĝojn de Douglas 19.07 kaj Bård 23.07)

En la reta korespondado kun UEA konstatigis, ke tiu ĉi jaro estas prova. Ĉi-jare mankis tempo por agi, sed ni deziras serioze provi venontjare.

7. Ekonomio de NEL, malmultaj re-kotizintoj kaj plialtigita domluo (vidu mesaĝon de Douglas 07.08).

Ni diskutis, ĉu indas plurpaŝa strategio de kotizkolektado (kruco sur NE – sms – retletero – paperletero). Ni decidis provi solvi la nunan kotizproblemon per elsendo de paperaj leteroj laŭ pasintjara modelo, kun informoj pri Vipps. Bård sendos la modelan leteron al Marianne, kiu dissendos leterojn al la nepagintoj. Poste ni starigos modernan sistemon por kolekti kotizojn, eble per «Spond».

8. Skiza laborplano por 2021-22

a. Taskoj de la landa kunveno

i. konsideri la amplekson de la estraro

Ni decidis tion diskuti vintre kaj prepari eventualan proponon printempe 2022.

ii. konsideri retan jarkunvenon venontjare

Ni decidis prokrasti tiun decidon ĝis malfrua autuno.

b. Taskoj lau la laborplano

i. ekstera informado

1. retpaĝoj www.esperanto.no

Jardar kaj Judith administras la retpaĝon. Ili maloftege ricevas materialojn, ĉar malmultaj produktas artikolojn kaj malmulto okazas. Jardar ĝisdatigos la retpaĝon. Estu ĝustaj informoj kaj prefere aperu almenaŭ ĉiun trian monaton novaĵo.

2. Facebook kaj Twitter (+ aliaj kanaloj?)

Ni decidis aldoni informojn al la Facebook-grupo minimume ĉiun duan monaton.

Respondecas Bård. Ni publikigos grandparte la samajn informojn en la retpaĝo kaj en la Facebook-grupo (kun ligilo). Nia impresio estas, ke daŭre Facebook plej gravas por anonci aranĝojn, kompare kun Instagram, TikTok kaj aliaj. Pagante modestan sumon al Facebook oni povas informi tre multajn homojn pri aranĝoj, ekzemple kursoj.

3. Gazetaraj komunikoj (traduko de UEA-komunikoj?)

Ni decidis, ke tiu tasko ne estu same prioritata kiel aliaj informtaskoj. La ĉefaj ambicioj nun estu «Spond», la retpaĝo kaj la grupo en Facebook. Tamen Bård aŭtune kreu liston de lokaj gazetoj, al kiuj ni eksperimente sendu komunikon por konstati, ĉu io aperos. La tekstojn de gazetaraj informoj, regule sendatajn de UEA, oni ĝenerale unue prilaboru, antaŭ ol eventuale dissendi ilin al gazetoj.

Jen ekzempla teksto de komunikado al lokaj gazetoj en Tromsø, kiun Marianne provu sendi:

Tromsø-tungt esperantostyre. Marianne Lund og Claude Rouget fra Tromsø ble valgt inn i styret som henholdsvis sekretær og kasserer på Norsk Esperanto-Forbunds landsmøte i sommer. Nyvalgt leder ble Bård Hekland fra Bergen, tidligere bosatt i Tromsø.

Pro tempomanko la ceterajn subpunktojn de punkto 8, kaj punkton 9 de la tagordo ni decidis prokrasti ĝis nova, baldaŭa estrara interkonsiliĝo.

10. Venonta estrara interkonsiliĝo

La venonta estrara interkonsiliĝo okazos ĵaudon la 2-an de septembro je 20.00 per Zoom.

Protokolis Marianne Lund